2-a Jaro, N-o 29 (81)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

15. Aprilo 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

TUTMONDA KONJUNKTURO

Enkonduko. Per la postsekvoj de l' milito estis detruita tiu forta interligeco, kiu depost 70 jaroj de pasinta jarcento ekzistis inter naciekonomiaj organismoj, konsistigantaj la tutmondan ekonomion. Do la esenco de post milita evoluo de kapitalismo estis forta tendenco rekampetigi la tutmondan ekonomion por kunigi la disĵetitajn elementojn de naciekonomiaj organismoj. Tamen estus vulgara analogio konsideri la restarigan proceson en ĉiuj landoj kiel la derivaĵoj de sama kategorio. La milito postsekvigis ne nur la teritoriajn ŝanĝojn kaj translokiĝon de kelkaj landlimoj, sed ĝi ankaŭ detruis potencajn imperiojn kaj okazigis ampleksajn ŝanĝojn en la distribuo de riĉaĵoj inter diversaj landoj kaj kontinentoj kaj enlande inter diversaj klasoj, la milito transformis landojn kun eksportebla kapitalo je la landoj kun industria karaktero kaj male — la landojn kun altgrade evoluinta industrio ĝi ĉirkaŭis per malvastaj limoj de nur enlanda merkato; ĝi donis novan direkton al tutmondaj fluoj de varoj kaj kapitaloj kaj kiel ĉiam, dum gravaj historiaj momentoj datumantaj voj-ŝanĝon de l' historia evoluo, ĝi kreis novajn vojojn por internacia var-cirkulado kaj komerco. — Krom tio, kiel nun el la plej gravaj faktoroj perturbintaj la tutmondan ekonomion nun estas konsiderenda la proletara revolucio en orienta Eŭropo — en la lando, kiu antaŭ l' milito estis nur agrara kompletigaĵo al industria Eŭropo. — Tial la nuna tutmonda konjunkturo, sur la fundo de kondiĉoj, direktantaj la restarigadan proceson de postmilita kapitalismo, havas varian karakteron en diversaj landoj. Do antaŭ l' nia resuma konkludo ni proponas al legantoj de "Sennaciulo" koncizajn skizojn pri ekonomia stato de kelkaj landoj por evidentigi la rolon de tiuj elementoj, kiuj en tiu aŭ alia grado permesas paroli pri unuforma tutmonda konjunkturo.

Sur la vojo al katastrofo

(Ekonomia stato de Polio)

Pola registaro ricevis la raporton, subskribitan de l' reprezentantoj de industrio, komerco, bankoj metiaj kaj agrokulturaj kiuj plej bone karakterizas la nunan ekonomian staton de Polio.

"La ekonomia vivo de Pola Respubliko stagnas kun ĉiu tago, kun ĉiu horo . . . La senlaboreco en industrio ĉiam kreskas kaj jam estas karakterizebla per nombro de senlaboruloj 213000; kia konsistigas 30 % de ĉiuj laboristoj, nun okupitaj en industrio. Tiom alta % de senlaboruloj estas konstatebla ankoraŭ en neniu lando de Eŭropo. Tiuj laboristoj, kiuj ankoraŭ estas okupitaj ĉe l' industriaj entreprenoj, laboras ofte ne pli ol 5 aŭ 4 kaj eĉ 3 horojn en la semajno. La situacio ĉiam pli malboniĝas . . . La tuta industrio stagnas, ĉar mankas aĉetantoj por fabrikaĵoj. Etbienaj terkulturistoj, kiuj ĉiam estis grava faktaro determinanta la amplekson de l' enlanda merkato, ne havas monrimedojn por aĉetadi la industriaĵojn. La grandaj bienuloj, kiuj nun estas prematai per ŝarĝo de pagendaj ŝuldatestoj, ankaŭ ludas nenian rolon en amasa konsumado de l' industriaĵoj. La laboristoj ĉe nuna stato de preskaŭ mortanta industrio, nenion povas aĉeti.

La oficistoj pro malgrandiĝo de salajroj, ankaŭ ĉesas aĉeti. La metiejoj havante la sorton de l' industrio, likvidiĝas ĉiam pli kaj pli grandnombre.

La komerco neniam estis en tiom malbona situacio kiel nun . . .

— Sinjoro, Prezidanto, — lamentas en malespero kvalifikitaj reprezentantoj de pola burĝaro, — la tuta ekonomia vivo de Polio stagnas. Pluraj entreprenoj jam pereis tute — sen eble ilin restarigi. Ni ne povas perdi eĉ unu minuton por ion fari . . .

Ĝis nun la ideologoj de pola burĝaro havis iluzion, ke Polio kun siaj naturaj trezoroj povas per propraj fortoj neniigi postmilitan kaoson kaj la registaro devas nur reguligi la fluon de alilandaj kapitaloj, kiuj tuj penetras en la landon, kiam la pordoj estos invite malfermitaj por ĝi. Nun tiaj iluzioj, kiel atestas la citita raporto al Prezidanto de Respubliko, estas rompitaj de kruela viv-efektivo.

Rezulte de versajla pac-traktato, Polio ricevis riĉan heredaĵon. Ĝi havas vastan teritorion, kiu estas riĉa je naturaĵoj: karbo, erco, fero, nafto, arbaroj kaj fertila glebo. Sed utiligi tiujn trezorojn juna respubliko ne sukcesis. Tiu ĉi problemo restas nesolvebla eĉ en tia riĉa kaj monolita lando, kiel Francio. Protektanto de Polio, Francio mem, fariĝis vazalo de anglo-usona kapitalo kaj tial por savi propran frankon ĝi estas ĉiam preta viktimigi Polion.

En tia situacio Polio estis tute malpova por plenumi tian ampleksan taskon, kiel l' ekonomia kunfandigo de tri malsamaj partoj kun malsama grado de industria disvolviĝo kaj diversaj kulturaj tradicioj. La geografia situacio de Polio, — najbare kun potencaj kaj industrie pli evoluintaj landoj de Eŭropo — manko de oportunaj marvojaj komunikiloj, malhelpas la pluan progresadon de pola industrio kaj komerco.

Polio nun estas t. n. "mixtum campo situm", t. e. la ŝtato, kies landpartoj estas malforte interligitaj kaj ekonomie gravaj al tiuj ekonomiaj organismoj de kiuj ili estis apartigitaj.

La eksterlanda kapitalo evitas investiĝi en Polio. Se iu el eksterlandaj kapitalistoj estis donanta monon, la proponitaj kondiĉoj estis tiom malfacilaj por prunte-

prenanto, ke ili fakte ignoris la suverenecon de Pola Respubliko:

La ĝermantan krizon ne evitigis ankaŭ la kelktempa stabiligo de pola valuto. Post 15 monatoj de stabileco, la nova pola valuto kun nova monunuo — zloto — evidentiĝis danĝerajn simptomojn de daŭra kurzfalado.

Malgraŭ ke pola registaro provis ĉiujn disponeblajn reguligilojn de mona cirkulado, la financa krizo pliakutiĝis kaj 16. dec. 1925, ĉe londona borso "la zloto" estis kotizata jam laŭ 59,8 % de sia orvaluta parito. Kaŭze de l' menciita raporto la ministro de financoj refoje deklaris en parlamento, ke la ŝtata kaso estas malplena kaj konstatis "la krizon de konfido al registaro" en kaj ekster Pollando...

Sen multaj provoj la parlamento konstatis, ke l' industrio kaj la ŝtato estas antaŭ absoluta bankroteco. La ilustraĵoj estas, ke la plej granda pola banko por industrio kaj komerco, por garantii kreditan subtenon de l' eksterlandaj bankoj, konsentis la malhonoran kontrolon flanke de "Banca Commerciale Italiana". La parlamento konsentis la prunton de 600 mln. zlotoj garantiendan per kaŭciigo de l' alkohola kaj tabaka monopoloj de la ŝtato.

Sur fundo de l' skizitaj ekonomia kaj financa krizoj, kreskas la putreço de l' burokrata aparato. La korupteco fariĝas generala fenomeno. Ĉion ĉi akompanas la sistemo de blanka teroro, persekutado je laboristoj, malesperaj ekribeloj de malsataj senlaboruloj, dum kiuj la polico provokas la masakron al popolamasoj (rememoru pri Kalisz-incidentoj k. a.)

Plifortiĝas la ekspluatado de labormasoj dum kreskas la ŝarĝo de impostoj kaj kareco de viv-necesaĵoj. Ne nur laboristoj, sed ankaŭ la oficistoj kaj etburĝaro senteblege spertas kiel malboniĝas la ekonomia situacio, kreskas la mizero kaj super la lando densiĝas la krepusko...

N. Krassovskij.

La ekonomia situacio de laboristoj en Litovio

(Fino.)

Kia estas en urboj? Kiel menciite, tre malbone: la laborejoj fermiĝas, komercaj entreprenoj, bankoj likvidiĝas aŭ bankrotas. Tio alvenas, ke la nombroj de senlaboruloj pli grandiĝas kaj allasitaj ĉe laboro oni etigas ilian salajron, pli longigas la labortempon. Ni citu ciferojn, klare pentrantaj la mizeran staton de l' "laborantoj"—

1. Korka uzino "ŝlos": El 70 laboristoj restitaj nur 30 (la elĵetitaj laboristoj ne ricevis kompenson); salajro de 3 ĝis $4^1/_2$ lidoj po tago (10 lidoj = 1 usona dol.); la nematuraj laboristoj laboradas la saman tempon kaj ricevadas ankoraŭ pli etan pagadon. Kuracisto malestas kaj se vundas sin laboristo ĉe maŝino, li devas mempage kuracadi ne ricevante salajron dum la malsantempo. Nun oni nur laboras tri tagojn dum semajno. 2. Skatoluzino "Bekoro": laboradas 5 tagojn dum semajno, perlaboras de 3 ĝis 10 lidoj po tago (antaŭe la laborpago estis de dek ĝis 17 lidoj po tago). 90 laboristoj el kiuj 51 estas maturaj: 8 viroj kaj 43 virinoj; nematuraj: 9 viroj, 30 virinoj. 3. Alumetuzino "Balkano": laboristoj 85 (15 viroj kaj 70 virinoj) el kiuj 60 estas nematuraj. Laborpago de 3 ĝis 10 lidoj po tago por viroj, de $2^1/_2$ ĝis $4^1/_2$ por virinoj. 4. Alumetuzino "Etna": 80 laboristoj: 25 viroj kaj 55 virinoj. Laborpago: viroj — de 5 ĝis 10 lidoj kaj virinoj — de $2^1/_2$ ĝis $3^1/_2$ lidoj po tago. 5. Bakejo "Lomkin": 8—20 lidoj po semajno (nematuraj laboristoj), 18 hora labortago. 6. Ŝuistoj: 15—16 hora labortago, — 40—50 lidojn po semajno. Tio estas en Kaunas. 7. En Ukmergè: taglaboristoj — 12—14 hora labortago kaj salajro 4—5 lidojn po tago. ("Glokn" unufoja lab. ĵurnalo eldonita en Kaunas 12. I. 26.)

Tiuj-ĉi sekaj kaj mutaj ciferoj parolas al ni pli bone ol ĉiuj deklaracioj kaj promesos de ĉiuj legalaj partioj donantaj al la laboristaro pri plibonigo de ilia situacio. Imagu nur, kiel homo povas vivadi per tia salajro en urbo kune kun sia familio. Sed tiuj-ĉi jam estas feliĉuloj, ili ja havas "laboron"; ili do ne mortos pro malsatado malgraŭ ilia vivado estas malsata. Sed kion devas fari la miloj kaj miloj da senlaboruloj estantaj en Litovio? Kion devas fari la 5000 senlaboruloj en Kaunas, la 2000 en Ŝiaŭliaj, la 1500 en Panevežys, la 15000 en la aliaj urboj kaj urbetoj de la lando? En tiu ĉi nombro oni ne kalkulis ilian familion. Tia nombro estas por Litovio katastrofa. — Do ne miriga estas, ke homoj pro malsatado kaj malfeliĉa vivo faras ĉian aĵaĉon. Dum lastatempo pli multiĝis la akuzoj de memmortigo inter la laboristoj. Estas tragedie, kiam en agrara lando kiel Litovio homo devas aŭ morti aŭ mortiĝi pro peco da pano. Ĉiuj malliberejoj estas plenplenaj da krimuloj. En la malliberejoj de Kaunas sidas 1500, en Ŝiaŭliai — 1000, en Paneveža — 400, en la 20 distriktaj malliberejoj pli ol 1500 kaj en aliaj malliberejoj de la lando — ankoraŭ pli ol 1000 krimuloj. Entute sen la soldataj kaj memelaj malliberejoj estas enkarcerigitaj 5400 homoj de kiuj ne malpli ol 80 % enfalis tien pro ilia malbona ekonomia stato.

Kiel dirite, la provo de la laboristoj por organizi profligojn kaj malsankasojn renkontiĝas je la reakcio de la registaro, sed dum la sama tempo ankaŭ la registaro mem entreprenas neniajn paŝojn por plifaciligi la sorton de la laboristaro.

Oni konstruas grandajn, nebezonajn domojn, oni asignas multmilionajn monsumojn por policaro, pastraro kaj aliaj malutilaj organizaĵoj kaj entreprenoj, sed por helpadi la senlaborulojn la burĝuloj nur ridas eĉ dum la sejmdebatoj kaj asignas pro tia afero nur unu milionon dum jaro, sed ankaŭ tio ne por rekta helpo sed... por asocia laborado. Kion tio signifas mi jam bone scias: pripensu nur la pafadon al la laboristoj en la lasta jaro en Kaunas, kiam ili, la laboristoj, postulis, ke estu pligrandigitaj iliaj salajroj.

Multajn laboristojn la litova registaro ĵetas Francion, kiu ilin ekspluatas kiel brutaron kaj preskaŭ ili ĉiuj forkuras de la laboro. La tuta litova gazetaro siatempe estis plena je malĝojaj alvokoj, de tiuj-ĉi malfeliĉuloj pro helpo.

Kompreneble, ke ĉe tia senlaboreco kaj senorganizeco estas tre malfacile por luktadi kontraŭ la labordonuloj, kiuj eluzante la kritikan staton de la laboristaro plimalgrandigas la laborpagon kaj pligrandigas la labortagon. Malofte okazas organizi strikon, kiu finiĝu je sukceso. Escepto estas nur la striko de la brosistoj en Vilkaviŝkis kaj Naŭjas Miestas: 120 homoj eltenis dumonatan strikon sen iu flanka helpo. Sed pro kio vi opinias, kamarado, ili tiel longe strikadis? — Nur por ricevi 50 % da normala salajro!

Kion do pensas la registaro; ĉu ĝi tute ne penas por plifaciligi la malbonegan staton de la laboristaro? Eble ke jes, sed ĝi tute ne povas tion fari. Ĝi ne povas konsenti inter si, certe pro personaj interesoj kaj principoj. Ekzemplo estu la jena okazo. En Litovio ĝis nun ekzistas militistareco malgraŭ ke jam pli ol kvar jarojn ĝis nun neniu militas. Al la registaro tio estas bezona, ke ĝi povu "laŭ leĝo" sufoki la gazetaron, organizaĵojn, kunvenojn, por pafadi kaj arestigi laboristojn. Sed la tragedikomedio konsistas, ke eĉ homoj de unu politika bloko ne povas kontakti ilian opinion pri la sama demando — pri la forigo de la militistareco: D-ro Draŭgelis (lidero de "Ukininky Sajunga") diras, ke la militistareco estas bezona por plibonigi (!) la ekonomian staton, kaj D-ro Stepanavičius (gvidanto de la kristan-demokratoj) pruvas, ke la militistareco kostas el la registarkaso pli ol milionon dum jaro kaj ĝi alportados malutilon al ekonomia vivo... (Lieturos Zinios", 14. II. 26, n-o 37). Ĉu estas bezona pli granda fiasko? Kaj tiaj homoj volas kreadi "socian opinion", konstruadi feliĉon kaj bonstaton al la popolo.

Kiel, ĉu tute ne estas iu eliro por plibonigi la ekonomian situacion de la lando? — Estas, sed ne ĉe la nunaj regantoj kaj ĉe ilia politika taktiko. Ja ŝajnas, ke la litovaj regantaj viroj jam delonge devis scii, ke la ekonomio "faras" la politikon: ili ja devis kompreni, ke la ekonomia bonstato de Litovio estas dependa de ĝia grandega orienta najbaro SSSR. Sed ili estis blindaj pri tio ĝis la lasta tempo rampante en la antaŭĉambroj antaŭ la okcidentaj politikistoj. Nun devigitaj je la vivo ili konfesas sian eraron kaj turniĝas parte orienton.

Sed ke per tiu paŝo estos iom plibonigita la vivo de la proletaro tio nur estos parto. La litova popolo jam bone scias kaj komprenas, ke ĝian vivadon povos plibonigi, plifaciligi kaj konstruadi nur propra — laborista regnaro.

Is. Neretis, Kaunas.

Letero el Alcatraz

La sekvanta letero estis skribita de soldato-kondamnitulo, kiu estis ĵus liberigita el Alcatraz-fortikaĵo, kie ankoraŭ troviĝas la Esperantisto k-do Paŭlo Crouch.
G. S.

San Francisko, Kalifornio

Al "The Dailey Worker"

Estante liberigita el la milit-malliberejo Alcatraz, Kalifornio, la 6. jan., estus eble oportune informi la laboristan klason usonan pri la stato ekzistanta tie; aparte pri ti-kio rilatas al k-do Crouch kaj Trumbull, la junuloj kies nura krimo estis esprimadi siajn politikajn opiniojn en usona armeo kaj la efektivigo de sia devo al sia frataro.

K-do Crouch, aparte, devas suferi la plej tiranajn maldignecojn. La plej malfacila laboro, kiu estas havebla estas al li almetata, laboro por kiu li ne plu estas taŭga ol estus masonisto kiel ĥirurgo. Neniun ajn penson oni oferas al lia tre evidenta kapablo intelekta. Li estis havanta grandan spertecon kiel ĵurnalisto, estinte kelkfoje novaĵ-editoro kaj afereditoro de grandaj ĵurnaloj. En Alcatraz estas presejo por eldoni armeajn bultenojn, ordonojn, skribilaron ktp. Crouch estas, la plej kapabla homo en la institucio por tiu ĉi laboro; tamen, oni donas al li pikilon kaj fosilon, kaj boksisto kaj farmisto faras la presaĵojn. La laboro, kiu estas al li almetata ne estus tiom malŝatinda, se li estus korpe taŭga por ĝi. Sed li ne estas. Li estas en malbona sanstato jam de jaro. Oni ĉiukaze mallaŭdas lin. En multaj okazoj lia konduto estis kvazaŭ heroa, ĉar li estis sufiĉe karakterforta por ne submetiĝi al alia proceso pro reprezalo. Oni superŝutadas lin per insultoj kaj li ne povas esperi rebonigon. Ne ekzistas al li alternativo krom sufero. Ŝajnas kvazaŭ oni planis konspiron por impliki lin je disputo, kiu estus rezultonta en alia militproceso.

Nenia laborist-klasa literaturo estas permesata en la malliberejo. Dum kelka tempo, por silentigi malfavoran kritikadon, al Crouch, kaj Trumbull estis permesataj "The Dailey Worker" kaj "Novij Mir", sed tiuj baldaŭ kiel la kritikado silentiĝis la gazetoj estis tuj forprenataj. Nune ili ne povas ricevi iuspecan radikalan literaturon. Eĉ "The Nation" (liberala dumonata gazeto) estas al ili rifuzata. Librojn, kiuj estas al ili sendataj de simpatiecaj geamikoj, oni aŭ detruas, aŭ resendas al la senditaro aŭ tenas ilin ĝis kiam la malliberuloj estos liberigataj.

Geamikoj ne povas viziti la kamaradojn en karcero. Neniu povas vidi ilin krom ilia advokato aŭ parencoj, kio signifas, ke ili vidas nur sian advokaton, ĉar el la parencoj, tiuj de la unua loĝas en North Karolina kaj de la alia en Nov-Jorko.

La poŝtaĵo estas tiel rigore cenzurata [1]) ke estas preskaŭ maleble verki leteron, kiu trapasus la cenzuriston. Ili ne povas mencii iun ajn okazintaĵon en malliberejo, nek iun ajn temon aŭ aferon, kiu koncernas personajn aŭ hejmajn aferojn. Tial la gekamaradoj kiuj estis tiel afablaj kaj skribis al ili, tamen ne ricevinte respondon, bonvolu ekscii, ke ne manko de dankemo kaŭzis la silenton de la enkarcerigitoj — simple ili ne povas skribi ion kio estus cenzurtaŭga.

Ankaŭ al ili estas permesataj nur po du leteroj semajne, tial estas memevidente, ke ili ne povas respondi ĉiun leteron, kiu estis al ili skribita. Tamen la kamaradaro estas petata, ke tio ĉi ne detenu ilin de ilia korespondado. La subskribanto estis rajtigita de ambaŭ — Crouch kaj Trumbull — ellasi ilian sinceran dankemon por la elmontrita bonfaremo, kaj peton, ke la korespondado estu daŭrigata. La solaj sun-



Paul Crouch

radioj, en ilia malgajega ekzistado, estas la leter-fluego de la translanda kamaradaro.

Se la supre priskribita stato estus ĝenerala kaj nepartieca, oni povus malmulte diri por defendo — t. e. malmulte kio estus peno — — inda — sed la traktado ne estas ĝenerala kaj nepartieca. Homoj, kiuj estas malliberigitaj en Alcatraz pro la plej malestimindaj krimoj kontraŭ homaro-krimoj kontraŭ ambaŭ, naturo kaj homo, estas preskaŭ nekredeble, ke tiaj estus ĝuantaj pli bonajn cirkonstancojn ol Crouch, kies nura krimo estas kompato por la subpremituloj de l' mondo. Sed, kiom ajn nekredeble, ĝi tamen estas fakto. Ĉiumaniere ili estas pli bone traktataj. Pli bona laboro; pli da privilegioj estas al ili donataj, ili ne estas subigitaj al malestimo kaj insultado kiujn Crouch devas suferi; la kontrolistoj estas pli ĝentilaj al ili; ĉiukaze oni permesas senti al ili, ke ili estas superaj, nur ĉar ili konformiĝas, sen protesto, al la kapitalista modo de aferoj.

Poste alia letero sekvos, kiu traktos pri la aferstato en Alcatraz.

Fratece N. Victor Hailey

Elangligis *Georgo Saville* Nov-Jorko

[1]) La tradukinto kelkfoje skribis al ili, Esperante kaj angle, sed neniam ricevis respondon.

Por malaltigi senlaborecon

Ministerio de transporto apartigis 6 mln. da funt. sterl. por voj- kaj pontkonstruado. Komitato de senlabora mono apartigis 25 mln. da funt. sterl. dum la lasta jaro kaj aprobas 8 mln. da funt. sterl. por la nuna jaro. La homoj dungitaj lastan jaron estas 33 mil. kompare al 29 mil. antaŭlastan jaron.

Ministerio de agrikulturo kaj fiŝarujoj elspezis lastan jaron 235 mil. da funt. sterl. Kaj por la venonta jaro ili aprobas 28 mln.

Leĝo de komercfaciligo permesis la elspezon kiel proc. de 70 mln. da funt. sterl. Lastan jaron estis elspezitaj 17,5 mln. da funt. sterl. kaj intencas apartigi aliajn 17 mln. por la nuna jaro.

Plano por eksporta kredito ĝis nun elspezigis 32 mln.

Tuta nombro de laboristoj okupataj pro helplaboro estas 94 mil. kompare al 91 mil. lastan jaron, nekalkulante la nombron okupatan nerekte transportanta materialon ktp. nek la plusan laboron, kiun provizis la plano por eksporta kredito.

La nuna sanasekuro depost la komenco de la nuna jaro.

Pago estas por:

viroj . . . . 1 ŝil. 6 penc.
virinoj . . . . 1 ŝil. 1 penc.

Antaŭan jaron ĝi estis:

viroj . . . . 10 penc.
virinoj . . . . 9 penc.

La dunganto rajtas depreni de la laboristoj:

De viro . . . . 9 penc.
De virino . . . . 6 penc.

La senlaborul-asekuro esti(a)s:

	Antaŭa	Nuna
Viro	1,7 ŝil.	1,3 ŝil. 3 penc.

	Antaŭa	Nuna	Pagenda de dunganto	
Viro . .	1,7 ŝil.	1,3 ŝil.	8 p.	7 p.
Virino	1,3 ŝil.	1,1 ŝil.	7 p.	6 p.
Knabo (16—18j.)	9½ p.	7½ p.	4 p.	3½ p.
Knabino	8½ p.	6½ p.	3½ p.	3 p.

Nombro de senlaboruloj, kiuj ricevas la subvencion pro senlaboreco estas 1,3 mln. Tio estas 11 proc. de la asekurita nombro. Salajro-ŝanĝo dum novembro: 78 mil. akiris pluson, 115 mil. perdis deprenon. La akiro estis 6 mil. da funt. sterl. la perdo estis 11 mil. da funt. sterl.

Krom la 1,3 mln. ricevintaj senlaborulan subvencion ankaŭ ricevas subtenon alia miliono (381 000) de la malriĉulzorgantoj.

	en miloj 1925	en miloj 1924	po 1000 loĝantoj 1924	po 1000 loĝantoj 1925
Homoj asekuritaj sub la senlaborula asekura leĝo (ĉu ricevantaj pagon aŭ ne)	438	328	113	85
Homoj kutime en regula okupado sed ne asekuritaj	36	38	9	10
entute	474	366	122	95
Ĉiuj aliaj homoj ricevantaj helpon	513	466	133	122
Tuta personaro ricevanta subtenon	987	832	255	217

J. Flower.

Memmortigoj en Latvio

Laŭ polica statistiko en Latvio dum 1925 jaro (ne alkalkulante la Riga'on) okazis 167 memmortigoj, inter kiuj estis 111 viroj kaj 56 virinoj. Laŭaĝe memmortigintoj dividiĝas jene: 18—20 j. 21, 20—25 j. 44, 25—35 j. 47 kaj pli ol 35 j. 55. El la tuta nombro sinmortigis per mortpafo 64, per veneno 23, per droniĝo 19, per pendigo 44, per tratranĉo de manarterio kaj gorĝo 5, per subvagonarigo 2. La kaŭzoj por tiuj memmortigoj en 21 okazoj estis malsano, en 35 — malfeliĉa amo, en 16 — mizero, en 17 — familia malkonsento, en 20 — vivtedeco en 8 — alkoholo. Pro nekonataj kaŭzoj mortigis sin 50 personoj. La viroj plej parte senvivigis sin per kuglo, dume la virinoj per veneno. Tamen la informoj de la polico ne estas ĝustaj, efektive la nombro da memmortigoj estas multe pli granda. En Riga la gazetoj raportas ĉiutage pri la malfeliĉuloj, al kiuj la morto iĝis la sola eliro el la mizera stato.

La vivo normiĝas kaj la kapitalo stabiliĝas, tamen morti ni ja devas ĉiuj, ĉu riĉulo, ĉu malriĉulo, ĉu ne? Hontu! *Neŭtralulo.*

Polaj financoj

Pola Banko, la polia mon-eldoninstitucio estis fondita en jaro 1924, kiam — post kompleta malvalorigo de pola marko — per ekstrema fortostreĉoj de tuta popolo oni kunprenis oron kaj alilandajn plenvalorajn bankbiletojn por 360 milionoj da svisaj frankoj kiel submetaĵo de pola valuto. Ĉi kapitalon kunmetis plejparte malriĉaj homoj. 36 % de tuta provizo enfluis de unuakciaj akciuloj (unu akcio = 100 zlotoj). Sur ĉi submetaĵo oni eldonis polajn zlotojn (florenojn). La valuto estis forta. La regularo de P. Banko malpermesis elspezi eĉ unu groŝon de provizo aŭ eldoni bankbiletojn pli je unu groŝo. Tamen en Polio valoras la regularo tiom, kiom la konstitucio, leĝo, vero kaj moraleco. Kio fariĝis kun la P. B. montras la suba tabelo, esprimita en polaj florenoj oraj (unu p. floreno egalvaloras unu svisan frankon).

Tempo	Provizo: de oro	Provizo: de plenvaloraj valutoj	Provizo: sume	Cirkulo: de bankbiletoj	Cirkulo: de metalaj moneroj	Cirkulo: sume	Garanti-procento
Decembro 1924	106	254	360	553	120	673	53 %
Decembro 1925	133	—	133	381	433	814	15 %
Februaro 1926	54	7	61	362	440	802	7,5 %

54 milionoj specifitaj kiel orprovizo en Februaro — jeno estas nur fikcio. Ĉi oron P. Banko formale posedas, sed ĝi troviĝas en Angla Banko — "lombardita" (fakte: forvendita). Dekalkulante tion elportas la garantiprocento en Februaro vere 0,8 %.

Tia estas rezulto de unujara mastrumado de pola burĝaro. La kapitalon elpremitan de malriĉiĝinta lando, kapitalon devenantan de proleta laboro formanĝaĉis la armeo, policistaro kun provokuloj pastraĉaro kts. akridaro — la reston oni fordiboĉis kaj forŝtelis. Kaj nun?! *Katilina.*

Kiom kostas proleto en Germanio?

Jen la respondo: Je la 29. sept. 1923 laboristo (Paul Schenk el Erfurt) troviĝis sur strato, ekstere de l' urbo; kaj pro malsato li ekprenis kelkajn prunojn for de la strato. Policisto vidis ĉi-tiun "krimegon" kaj minacis la laborulon. Post mallonga paŭzo la policisto mortpafis la "simplan proleton!" — Oni kondamnis la murdiston por sep monatoj da mallibero. Do, poste oni malkondamnis lin. — La patrino de la mortigito (62 jara) skribis leteron al la "gardisto de justeco", kaj nomis lin "mort-insidisto de mia filo"! Pro tiu-ĉi "krimo" ŝi estis punata per 6 semajnoj — da mallibero. (El "Berg-Echo".) Gek-doj! Ankaŭ en la "belega respubliko Germanio" la proleto valoras pli malmulte ol besto. Ni ne forgesu tian ekzemplon! Venos tago, kiam la laboristaro tutmonda rekompencos ĉion, kion la iloj de la kapitalismo fiagis kontraŭ la "modernaj sklavoj"! Tute egale. ĉu milito aŭ "paco", la sistemo kapitalista oferas proletojn sennombre, por sia profito. Ne *unu* k-do, ne la kamaradoj en ĉiu lando *aparte*, nur la proletaro *tutmonda* venkos la aron de ekspluatistoj! Tial unuiĝu per Esperanto kaj ŝparu homojn, monon kaj energion! *1851.*

Lando de mortigistoj

Antaŭ kelkaj tagoj statuartisto en Zagreb (Jugoslavio) okazigis sian amuzvesperon, post fino de kiu ili sin kolektis en "Kasaliĉna restoracija". Inter ili troviĝis ankaŭ laboristo Agust Cesarec, famkonata nia verkisto. Ĉe unu tablo sidis du-tri faŝistoj kun abomena aĉulo Berislav Anĝelinoviĉ, kiu mortigis page mineralelfosiston k-don Fakin en Slovenio 1. junio 1924, kaj kroatan respublikanon Marko Zovko sur strato en Zagreb, nature estante ne alvokita je respondeco. Tiu ĉi pagita mortigisto ekkomencis insulti nian plej aktualan artiston Ljubo Babiĉ, premiita je lasta internacia ekspozicio en London kaj pro tio invitita ekspozicii siajn artaĵojn en Ameriko. K-do Cesarec ne povante toleri insultadon kontraŭ lia amiko ekleviĝis kaj diris akre al provokisto: "Berislav Anĝelinoviĉ ne posedas rajton paroli en tiu ĉi lando. Oni nin enkarcerigas kaj bastonas pro ĉiu bagatelo kaj dum sama tempo mortigistoj plej libere promenas. B. Anĝelinoviĉ havas plej malmultan rajton paroli!" Tiam eksaltis tiu ĉi pikito, alproksimiĝis al Cesarec kaj lin mortintence frapis per ia malakra ilo rekte en okulo tiaforte ke k-do Cesarec sveninte plensanga falis teren. En proksimeco sidis unu policorgano rigardante tute flegme ĉion, kaj kiam Ljubo Babiĉ lin alvokis: "S-ro policestro, enordigu!" li ŝajnigis sin vidante nenion. Poste li ekkomencis kvazaŭ ordigi kaj de komenco "ekzamenadi" . . . Kuracisto konstatis, ke vundo estas peznatura kaj profunda, kaj ankoraŭ okulo de verkisto Cesarec estas en danĝero . . . Al Jugoslavio kondamnanta tiom nobla viktimo alvenas ĵurnalistoj kaj ili hipokrite demandas lin kial li ne plendis al juĝistaro, kaj k-do Cesarec ironie kaj terurigante ilin klaskonscie nur mallonge respondas: "Ho! kia utilo estus!!"

Internacia proletaro, ankoraŭ unu fojon malbenigu Jugoslavion, landon de mortigistoj! *Jug. SAT-kor.*

Sciigoj el Sibirio

1. Urboj de Sibirio rapide kreskas. Ĉefurbo de Sibirio *Novonikolaevsk* nun nomata *Novosibirsk* estis fondita ĉe riverego *Obj* nur en jaro 1893 kiam oni konstruis trasibirian fervojon. Dum 8 unuaj jaroj loĝantaro de l' urbo atingis 21 500 homojn. Post kiam sibiria reakcio estis venkita la urbo fariĝis ĉefurbo de Sibirio. Nun ĝi havas jam 100 000 loĝantojn.

La urbo *Irkurtsk* lokiĝanta proksime de lago *Bajkal* antaŭ la mondmilito havis nur ĉirkaŭ 50 000—55 000 loĝantojn. Nun ĝi same havas ĉirkaŭ 100 000 loĝantojn kaj bone aranĝitan universitaton kun 3500 studantoj.

La kresko montras disvolviĝon de industria kaj kultura vivo de l' lando. Do Revolucio bone efikas.

2. Frostoj de Sibirio iom post iom elmigras Eŭropon. Dum kvar lastaj jaroj meza temperaturo de la plej malvarmaj monatoj (decembro kaj januaro) en *Irkutsk* dufoje altiĝis (de — 27,2° ĝis — 13,4° C). ŝipirebla rivero *Angará*, kiu ĉe Irkutsk estas larĝa ĉirkaŭ unu kilometron, sukcesis glaciiĝi nur unuan de februaro kaj tute senglaciiĝis 15. marto.

La ŝanĝo de klimato por Sibirio devas liveri grandajn ekonomiajn sekvojn. Terkulturo devas disvolviĝi kaj dezertaj pro malvarmo senfinaj spacoj de Sibirio fariĝas facile koloniigeblaj.

3. Apud *Irkutsk* troviĝas riĉaj karbminejoj, kiuj en kuranta jaro liveras 500 000 tunojn da karbo, pli ol antaŭ revolucio. Senlaboreco en la minejoj estas tute likvidita. La minejoj estas elektritaj.

4. Inter *Pekin* kaj *Irkutsk* en nuna printempo komencos funkcii aervojo tra ĉefurbo de Burjatio *Verĥneudinsk*, ĉefurbo de Mongolio *Ulan Bator Ĥoto* kaj dezerto *Gobi*. Specialaj poŝtaeroplanoj reguligos rapidan komunikon inter Moskvo kaj Pekin.

5. En Montaro *Sajanoj* 200 kilometrojn de *Irkutsk* (sud-okcidenten) troviĝas riĉaj minejoj de grafito (karbonŝtono por fari krajonojn kaj ŝnuraĵon per maŝinoj). Ĝis milito ili estis ekspluatitaj de fama entreprenisto krajonfabrikanto *Aliber*, kiu ĉiujare liveris al sia fabrikejo en Germanion po 10 000 kilogramojn da grafito. La mondmilito kaj revolucio ĉesigis la ekspluatadon.

En nuna jaro la minejojn reekspluatis "Trusto de rusaj juveloj" (regna entrepreno) kaj jam sentas al krajonfabrikejoj 650 000 kilogramojn da grafito, kiu havas eksterordinare altan kvaliton.

Maksim Krjukov.

LABORISTA RADIO-INTERNACIO

Suplementa paĝo de Sennaciulo — Aperas dufoje monate

Radio-telefono trans la oceano

La eksperimentoj de transoceana telefono ĝis nun jam ne atingis tian progreson, ke senkritikaj, publikaj interrilatoj lingvaj tage kaj nokte povis esti certigataj. La interrompoj (atmosferaj ĝenoj el la varmegaj regionoj, absorbo de l'portantaj ondoj por la suno, diferencoj en la transporto al la diversaj sezonoj) estis ĉe la ĝisnunaj eksperimentoj, kiuj okazis kun proksimume 65 KW da transiga energio, ankoraŭ tro malutilaj fenomenoj. Por atingi la planitan celon, nome la starigon de ĝenerala telefonservo trans la oceano, la eksperimentoj devis esti daŭrigitaj per ankoraŭ pli altigata energio de aertransigo. Tiuj provparoloj, kiuj en lasta tempo estis direktataj inter amerikaj kaj anglaj telefonpartoprenantoj trans la stacioj Rocky Point sur Long Islando (U. S. A.) kaj Chedzoy en Somerset (Anglio) kaj atingis jam senkritikan kompreniĝon, atendigas tamen baldaŭan deflankigon de l'ankoraŭ ekzistantaj malfacilaĵoj kaj per tio la telefonon trans la oceano kiel fakto.

Nova venko

Radio-Stacio MGSPS en Moskvo eldonis poŝtkarton *kun Esperanto-teksto*, per kiu la aŭskultanto povas raporti kiam kaj kiun paroladon li aŭskultis de la nomita stacio. Per tio ĉiam pli kaj pli pruviĝas, ke Esperanto estas la lingvo de Radio.

Ĉekoslovakio

La nombro de la Radio-partoprenantoj estas nuntempe 32000.

La sendoforto de Brünn estas altigita ĝis 2,4 KW. Brünn sendas nun per ondo 521 m.


Radio-interligo Grenlando-Islando

Inter la lokoj Angmassalik, Godhaven, Godthaab, Ivigut kaj Julianehaab en Grenlando unuflanke kaj Islando aliflanke estas depost kelka tempo Radio-interligo instalita. Laŭ tio kaj stacioj de tiuj ĉi lokoj estas nun ankaŭ malfermitaj por la ĝenerala internacia informservo.

Ankoraŭ unu Radio-sendstacio estas konkirata

Malgraŭ tio, ke idistoj penis kredigi la mondon per rusaj kaj germanaj fakaj gazetoj, ke Kieva Radio-stacio uzas Idon, la vivo decidis alion.

La 14. marto en ĵurnalo "Kieva Proletario" — organo de loka komitato de kompartio — aperis la jena artikoleto:



LA TUROJ DE LA RADIO-SENDSTACIO SUR LA TEKNIKA FOIREJO EN LEIPZIG (Alteco 105 m)

Radio-Interligo

Kieva brodkasta stacio ricevis leterojn de kelkaj laboristaj kluboj el Germanio kaj Belgio, sciigantajn, ke tie oni aŭskultas kievan Radio-stacion. Laboristaj kluboj de Düsseldorf kaj Mannheim petas brodkastan Radio-gazeton en Esperanto.

Por kontentigi la petojn kieva Radio-stacio brodkastos parton de sia materialo en Esperanto.

Dume tiu "parto de l'materialo" konsistas el la devizo "Proletarioj de ĉiuj landoj unuiĝu!", transdonata en rusa, ukraina kaj esperanta lingvoj. Komenco de esperanto-Radio-kurso estas jam duan monaton principe decidita, sed diversaj "teknikaj" kaj "financaj" malfacilaĵoj ĉiam ĝin prokrastas. La demandon pri iom pli larĝa esperanta "parto de l'materialo" la brodkasta societo nun diskutas. Ĝi nur timas, ke tiun aŭskultos nur iu deko da personoj. Do, por definitiva venko ni bezonas pruvon, ke esperante aŭskultas pli, ol deko da eksterlandaj kamaradoj.

SAT-anoj-Radio-amatoroj, helpu nin, sendu al "Radio-Peredaĉa" (Nikolaevska str., Kievo, Ukraino, Sovet-Unio) leterojn, petante brodkastadon en Esperanto.

Sammaniere sovetiaj kamaradoj povus plirapidigi komencon de esperanta Radio-kurso. Des pli ni insistu, ke Tutsovetia Kongreso de Radio-amatoroj ĵus akceptis Esperanton.

Teodoro Fedotov (728).

Alvoko!

Nun ankaŭ ekzistas en Elberfeld (Germanio, Rejnlando) lokogrupo de Germana Laborista Radio Klubo. Ĝi estis fondata en la monato februaro ĉi-jare, ĉar estis nepre necese formi defendfronton de ĉiuj lab. Radio-amatoroj kontraŭ la antiproleta tendenco en la programo de l'Radio-stacio Elberfeld. Sed ne nura stacio Elberfeld, sed preskaŭ ĉiuj Radio-stacioj de la mondo troviĝas en la servo de l'kapitalismo internacia. Ili estas por ĝi ne nur tre bonaj monfariloj, sed ankaŭ la plej bonaj rimedoj por malspritigi la cerbojn de l'proletoj. Tial estas la plej eminenta devo de ĉiu klaskonscia laboristo, kiu posedas iun Radio-aparaton, kunbataladi kontraŭ la nova, sed plej danĝera malamiko de la laborista klaso. Gekamaradoj! Ne plu hezitu! Fondu tuj ĉie lab. Radio-grupojn! Helpu venki la antiproletan tendencon en la programoj de Radio-stacioj kaj farigu ilin kiel klasbatalaj rimedoj proletaj! Antaŭen ĝis la fincelo estas atingita. La lab. Radio-amatoroj de Elberfeld estas ĉiam pretaj por helpi vin. Adresu skribaĵojn al Artur Wieditz, Grünewalderberg 52, Elberfeld, Germanio.

Svisio

La sendoforto estas altigata ĝis 5 KW.

La nova sendstacio en Basel komencos dum tiuj ĉi tagoj sur ondo inter 900 ĝis 1300 m.

ESPERANTO-MOVADO

La vojoj de Esperanto-progreso en Sovet-Unio

Ĉiu numero de "Internacia Lingvo" portas novajn informojn pri novaj sukcesoj de Esperanto.

Kaj tiuj sukcesoj estas despli gravaj, ke ilia bazo ne estas ies aprobo, ies simpatio-deklaro, sed reala kaj serioza utiligo de Esperanto por celoj kulturaj kaj klasbatalaj.

Admirindan kaj seriozan laboron ni vidas en ĉiuj partetoj de nia vastega Sovet-Unio. Mi estas ĝenata citi iun speciale modelan urbon, ĉar dekoj de aliaj urboj tute prave povus pretendi, ke ankaŭ ili estu citataj.

Tial prefere, ni citu neniun, sed anstataŭ tio ni faru kelkajn konkludojn pri la nuntempa situacio kaj niaj taskoj plej proksimaj.

Unue ni konstatu, ke SEU-movado fariĝas vere masmovado. Laŭ statistikaj informoj la membraro de SEU organizaĵoj jam atingas la nombron 10000. Jam 3400 membroj estas registritaj ĉe CK de SEU kaj regule ricevas nian duonmonatan gazeton "Internacia Lingvo".

Nia gazeto havas duoblan nombron da abonantoj, kompare kun tiu de la antaŭmilita ruslanda "La Ondo de Esperanto".

Nia aktiva membraro superanta tri milojn estas tre ŝatinda kerno, kiu garantias nian pluan kreskadon.

Kaj la kaŭzo plia, kiu helpos al nia kreskado estas tio, ke *ni foriris el niaj kluboj pure esperantaj, ke ni eniris uzinojn, oficejojn, klubojn profesiajn, ke ni Esperanton faris rimedo anstataŭ celo.* Ni disponigis lingvon internacian al vastaj popolmasoj kaj tiuj popolmasoj estos la senfunda provizejo, el kiu ni ĉerpos novajn batalantojn por nia afero kaj idealo.

Esperanto eniris lernejojn kaj klubojn profesiajn. Esperanto almilitis rondojn de blinduloj kaj de Radio-amatoroj. Esperanto-kursoj oficialaj de ŝtato patronataj fondiĝas diversloke. Sennombraj kluboj kaj ĉeloj uzas Eperanton por la internacia korespondado.

Kaj plej aktiva estis ĉie kaj ĉiam la Esperanto movado en la urboj provincaj, en la malproksimaj anguletoj de la Sovetio.

Vere, moskva Esperanto-movado estas malplej rimarkebla. La CK de SEU kulpas pri tio. Ĝi ne zorgas pri Esperanto-kursoj, lekcioj, propagando en Moskvo, aŭ ĝi zorgas pri ĉi-tio nur iom kaj malmulte.

CK de SEU ĉefe zorgis kaj ĉefe helpis al aliurbaj kamaradoj per ĝusta direktado de iliaj fortoj kaj akceloj.

Kaj rezulte ni fakte konstatas fortplenan Esperanto-movadon ĉiuloke kaj vegetantan Esperanto-movadon en Moskvo.

Ŝed la taktiko de CK estis ĝusta. La masmovado por Esperanto en provinco, ne kreebla en Moskvo, kaŭzas tion, ke la rezistantaj baroj komencas krevi kaj fali.

Ne pro insidaj klopodoj de CK, ne pro agitado de CK SEU, sed konstatante la realan forton de Esperanto-movado:

1. Poŝttelegrafa komisariejo subtenas Esperanton kaj komencas uzi Esperanton por siaj oficialaj eldonoj.
2. CK de la Komunista Junularo atentigas siajn klubojn pri kreo de Esperanto ĉeloj.
3. Agit-prop. fako de CK. de Tutunia Kompartio serioze pritraktas la problemon pri Esperanto. La movado postulas atenton. Kaj tiu atento estas donata.

Antaŭ kelkaj tagoj unu kamarado, gvidanto de grava fako de ŝtata vivo diris al mi: "Fakte mi ne fidas al Esperanto kaj ĝia triumfo, sed vi ja ekzistas. Tion ni devas konstati. Kaj se vi ekzistas, do necesas vin utiligi, necesas utiligi tiun lingvon, kiun vi prezentas".

Ne per teoria diskutado, sed per fakta laborado ni venkos kaj superos la supersticojn, ekzistantajn kontraŭ lingvo internacia.

Daŭru kreski nia anaro! Daŭru kreski samprogrese nia laboro!

Dum la III. SEU Kongreso en Leningrad (aŭgusto 1926) ni devas rajte proklami: Ke la nombro de SEU-anoj duoble superas la nombron de UEA-anoj, ke la nombro de abonantoj de "Internacia Lingvo" duoble superas la nombron de legantoj de la "Heroldo de Esperanto".

Tiu proklamo estos nia modesta saluto por la VI. SAT-Kongreso en Leningrad kaj por la eksterlandaj kamaradoj, venontaj Sovetion.

E. Drezen.

Atentu!

La rondeto de esperantistoj ĉe sverdlovska lab. fervoja klubo je nomo de Vajner komencas eldonadi esperantistan murgazeton. Ni petas eksterlandajn SAT-anojn sendadi en ĉi-tiun murgazeton artikoletojn pri sindikata movado, vivo kaj moroj de proletariaro, kluba laboro, pri politikaj kaj socialaj demandoj, pri virina kaj junula movadoj, pri teknikaj fervojaj temoj, pri vivo de eksterlandaj esperantistaj organizaĵoj ktp.; tre dezirinde estas ricevi priskribojn de l' tagoj 8. marto 1926 (tago de laboristino), 18. marto 1926 (tago de pariza komuno) eksterlande; skribu leterojn okaze la proleta festeno — 1. majo 1926 — Ni uzos la materialon por unumaja numero de mur- kaj ĝeneral-gazetoj esperantista kaj neesperantistaj. Responde ni skribos al vi pri la sama.

Krom tio la rondeto dum unua duono de majo aranĝas esperantistan ekspozicion. Ni petas ĉiujn SAT-anojn kaj esperantistajn organizaĵojn sendadi al ni ĉion taŭgan por ĝi: esperantaĵojn, planojn de l' laboro, raportojn pri la laboro, tabelojn de kreskado de esp-movado en via loko, regiono kaj lando, nacilingvajn ĵurnalojn, gazetojn ktp. Laŭ via deziro ni povas resendi la ricevitajn materialojn aŭ rekompence sendi la konforman nian.

Skribu! Sendu! Ĝi estas la plej sukcesanta agitado por nia afero.

La adreso: Sovet-Unio, Sverdlovsk, strato de Karl Liebknecht, 38, klubo de Vajner, rondeto de Esperanto.

Esperanta movado en la ruĝa armeo

En la ruĝa armeo esperanta movado ankoraŭ ne havas grandajn sukcesojn. Tamen kelkajn paŝojn ni, ruĝarmeaj esperantistoj, faris antaŭen.

Ekzemple, en moskva militregiono ekzistas esperantaj rondetoj en kelkaj regimentoj kaj en kavaleriaj militlernejoj. En unu el regimentoj eĉ laboras vigla esperanta rondeto kaj ruĝarmeanoj sukcesis per Esperanto ligiĝi kun eksterlandaj laboristoj-esperantistoj.

Same esperantaj rondetoj ekzistas en regimentoj de la siberia, ukraina kaj aliaj militregionoj.

En nia okcidenta militregiono estas fondita militsekcio ĉe Blankrusia Centra Oficejo de Sovetlanda Esperantista Unio. Kiel gvidanto de la sekcio, mi povas diri, ke ni jam havas sukceson. Post tri monatoj de tago, kiam ni komencis labori, ni jam havas en regimentoj kaj batalionoj de nia regiono pli ol 150 kamaradojn, kiuj lernas Esperanton en rondetoj sub gvidado de pli spertaj kamaradoj. Tri rondetoj jam sukcesis sendi eksterlanden 15 leterojn kaj ricevi el eksterlando 8 leterojn. Krom tio la rondetoj sukcesis ligiĝi kun du aŭstriaj soldatoj.

Kiamaniere estas organizitaj niaj rondetoj? Ili ekzistas ĉe niaj klubejoj kaj anguletoj je nomo de Lenin kaj laboras unu ĝis du fojojn semajne, kiel ĉiuj aliaj rondetoj kaj klubejoj. Do vi vidas, ke iom esperantaj rondetoj eniras komunan sistemon de politiklaboro en Ruĝa Armeo.

Nia armeo estas vere internacieca. La celo de nia esperanta laboro en Ruĝa Armeo estas helpo por organizado de la tutmonda laborista unuecfronto. Ni ne deziras pafadi laboristojn kaj dum la estonta milito ne pafados ilin. Niaj pafceloj estas burĝulaj ventraĉoj. Per esperanto ni volas rakonti tion-ĉi al la laboristoj kaj soldatoj de la tuta mondo kaj konvinkigi ilin agadi sammaniere kaj ellernadi militsciencon bone, por bone venki en la estonta milito por la laboristaro. Same ni deziras per leteroj transdoni nian politikan kaj militan spertecon al eksterlandaj kamaradoj. Tial ni petas laboristojn kaj soldatojn eksterlandajn: Skribu al ni!

Vivu tutmonda laborista kaj soldata unueco!

Ruĝarmeano *R. Nikolskij.*

Esp-o kaj la finnlanda registaro

La ministro de publika instruado de Finnlando konsentis subvencion de 6000 markoj por la organizo de speciala kurso de Esp-o por instruistoj dum la ferioj de kristnasko kaj por la disvastigo de broŝuro en Esp-o verkita de s-ro E. Setälä, profesoro de lingvistiko de la Universitato de Helsinki kaj nuntempa ministro de eksterlandaj aferoj de Finlando.

I E.S.

Daŭrigu la varbadon por Sennaciulo!

Internacia Studkomisiono kaj Komintern

Kion faras la internacia studkomisiono de Komintern?

Kio estas la rezulto pri akcepto de lingvo internacia??

K-do 409 Pilsen turnis sin al ĉekosl. centra agitprobfako per jena letero, ĉeklingv.

Plzen, 16. 3. 1926

ESTIMATAJ K-DOJ!

En la nomo de l' komunistaj esp-istoj ĉe MVS (t. e. Intern. ĉiuprofesia ligo), oni afable postulas la centran agitpropfakon en Praha, ke ĝi respondu la demandon koncerne rekomendo de internacia lingvo en la kadro de l' kom. partio en Ĉekoslovakio. Se vi ne kapablos tion fari, bonvolu vin turni al Moskvo, por ke tie oni fine por ĉiam klare solvu tiun demandon.

Ĉis nun tiu ĉi movado estas en Ĉekoslovakio multe disigita, kio certe en nia partio ne estas allasebla. Mi aldonas, por konvinki vin, notojn el kom. gazetoj pri Esp-o kaj Ido. En unu gazeto ni skribas pri Esp-o, en la alia pri Ido, kies rezulto estas granda kaoso kaj lingva "babilono" inter la ĉekosl. laboristaro.

Estas absolute necese, ke estu eldonita oficiala rekomendo, aŭ de Esperanto aŭ de Ido. Ne eble estas al laboristo lerni ambaŭ tiujn lingvojn, kion vi certe konsentas. Ĉi tie en Plzen ni estos preskaŭ 100 kom. esp-istoj kaj estos necese, ke oni akomodu al la plimulto.

Kun kom. saluto R. B.
n-o de MVS 89595.

Jen la respondo, kiun ricevis k-do 409:

Sekretarejo de l' Komunista
Partio en Ĉekoslovakio
(Sekcio de la III. Internacio)
Praha-Karlin
Královská třida č-o 13

Praha, 22. 3. 1926

KAMARADO R. BURDA
Plzen.

Koncernas: Intern. lingvon

Estimata Kamarado!

Je via demando koncerne Esperanton kaj Idon, ni informas vin, ke ne eblas solvi tiun demandon per la laboro de la ĉekosl. kom. partio, sed ĝi estos solvata internaciskale. Komintern enketis por solvi tiun demandon jam pasintan jaron informojn el diversaj landoj pri Esperanto- kaj Idomovadoj, kaj ankaŭ ni (la ĉekosl. kom. partio) sendis al ĝi tiun enketon. Estis starigita internacia komisio, kiu studos tiun ĉi aferon, kaj solvos ĝin depende al ĉiuj sekcioj de Komintern. Pri la rezulto de tiu studkomisio mi ĝis nun nenion eksciis kaj verŝajne la komisio ĝis nun ankoraŭ ne finis sian laboron. Ĉis la demando estos solvata, ni publikigos per konvena maniero la rezulton.

Kun komunista saluto por la Agitprop-fako de KPĈ
J. Guttmann
(Ŝtampilo de sekretarejo)

Gek-doj el Sovet-Unio nun klare vidas kial Esp-o ne povas disvastiĝi inter la membraro de la III. Internacio. La gvidantoj de la kom. partioj el la plej multaj landoj ordinare kontraŭstaras la esp. propagandon en la kadro de la partio, kaj atendas ĝis la komisio de Komintern solvos la demandon, ĉu Esperanto aŭ Ido.

K-doj el Sovetio devas zorgi pri la solvo de tiu demando kaj ĉiulandaj k-doj *nepre postulu ĉe la centroj de kompartioj,* ke ili respondu la demandon. La sekciaj centroj el ĉiuj landoj estu devigataj demandi ĉe Komintern Moskvo la oficialan rekomendon de Esp-o aŭ Ido. Certe nur la pli taŭga lingvo povas esti rekomendota. Al la laboro!!

409 Pilsen

VI. Asoci-tago de LEA por la germanlingvaj regionoj

La belega urbo Stuttgart kun siaj admirindaj montoj kaj pejzaĝoj estis elektita de la germanaj esperantistoj laboristaj kiel kunsidloko por la VI. asoci-tago de LEA por la germanlingvaj regionoj. Do, dum la paskaj festotagoj ĉi-jare alvenis Stuttgart-on delegitoj de laboristaj esperantogrupoj el ĉiuj direktoj de Germanio. Krome ankaŭ ĉeestis k-do Marcel Roux-Lyon (Francio) kiel reprezentanto oficiala de SAT kaj hungara k-do.

Vendredon posttagmeze la pli vasta estraro la unuan fojon kunsidis preparante la asoci-tagon. La saman tagon vespere la Stuttgart-a grupo estis aranĝinta salutsolenon. Sed fakte ne okazis soleno en ĝenerale kutima formo, mankis en la programo amuzaĵoj kaj aliaj "solenaĵoj". La ludantoj, kantistoj, gimnastuloj ktp. venis en simpla proleta vestaĵo sur la scenejon. Kontente oni ankaŭ devas noti, ke la Stuttgart-a laboristaro sufiĉe atentis tiun asoci-tagon. La salonego estis plena, do, la plejmulto el la ĉeestantoj estis neesperantistoj. Diversaj organizaĵoj lokaj kaj tutgermaniaj, politikaj partioj, sindikatoj kaj aliaj proletaj organizaĵoj sendis siajn delegitojn, kiuj senescepte esprimis, ke ili konvinkiĝis de la valoro kaj neceso de Esperanto por la internacia laboristmovado ktp. Krome ankaŭ parolis kaj salutis la asoci-tagon k-do M. Roux komisiite de la E. K. de SAT kaj hungara k-do. Tiuj ambaŭ k-doj precipe pruvis al la multaj neesperantistoj praktike la valoron de nia nelimigita tutmonda lingvo. La kantunuiĝoj ankaŭ prezentis kelkajn kantojn en Esperanto, i. a. la fame konatan "Tord Foleson" de Uthmann.

Sabaton matene komencis la unua laborkunsido. K-do Just malfermis la asocitagon en la nomo de la loka asoci-taga komitato kaj elektigis la gvidantaron kaj la diversajn komisionojn (mandatan kaj proponesplorantan).

La raportoj de la estraro, kasisto, redaktoro de A. E. (asocia organo) kaj de la presservanto montris, ke la movado en Germanio estas iom malhelpata pro la malbona ekonomia situacio. Aliflanke montriĝis, ke la laboro de la asocio estas ankaŭ tamen sufiĉe fruktedona. La simpatio precipe kreskas kun ĉiu tago por nia ideala movado.

Grandan diskuton kaŭzis la lernolibra afero. Kelkiuj k-doj deziras la lernolibron laŭ rekta instrumetodo, aliaj k-doj preferas lernolibron kun detala germanlingva gramatika parto ktp. Post sufiĉe longa diskutado la asoci-tago decidas eldonon de du lernolibroj laŭ ambaŭ instrumetodoj cititaj. Por la verkado estas elektitaj por la rekta metodo k-do Puff-Frankfurt, kaj por la alia k-do Deubler-Munĥeno. Krome la asocia tago elektis lernolibran komisionon, kiu havas la taskon kontroli la manuskriptojn por la lernolibroj kaj laŭ neceso proponi al la verkantoj eventualajn ŝanĝojn aŭ pliperfektigojn.

La sekvanta punkto "propagando kaj niaj estontaj taskoj" ankaŭ tre profunde estas priparolitaj. Poste estas decidita eldono de bonefika propagandafiŝo ktp.

Pri la temo "nia movado internaciskale" estiĝis post du paroladoj (parolis germana k-do kaj k-do M. Roux en la nomo de SAT) nur mallonga diskutado, do, la asocitago konsentis al la opinioj de ambaŭ parolantoj, ke nun ankoraŭ naciaj propagandorganizaĵoj kaj tamen ankaŭ peresperanta organizaĵo tutmonda necesas. Certe tiu asoci-tago estis plura paŝo al la kolekto de ĉiuj laboristaj esperantistoj en la tutmonda peresperanta "Sennacieca Asocio Tutmonda". Propono, kiu postulis pliampleksigon de la esperanta parto en la asocia organo "Der Arbeiter-Esperantist" estas malakceptita. Al tiuj k-doj, finintaj la esperantokurson kaj dezirante legi pli da esperantoteksto, la asoci-tago rekomendis aboni "Sennaciulo"n kaj aniĝi SAT.

Rilate la presservon estas akceptita projekto, kiu diras, ke la presservanta aparato estu pli grandigota. Ne nur ekzistu de nun centra presservo, sed en ĉiu distrikto kaj en la pli grandaj lokoj estu presservantoj, kiuj konstante interrilatas kun la centralo, kaj nature precipe kun la loka gazetaro. Tiamaniere la peresperanta laboro en la intereso de la ĝenerala laboristmovado propagandante samtempe por esperanto estos plej efika praktika apliko de nia lingvo kaj pruvo por la taŭgeco kaj valoro de Esperanto por la internacia laboristmovado.

La punkto "Novelektoj" estis tre rapide finita. La asoci-tago elparolis al la ĝisnuna asoci-estraro la plenan konfidon kaj unuvoĉe reelektis la estintan estraron por la sekvantaj du jaroj. Do tio estis bonega signo, pruvo ke nia asocio estas en tiuj manoj, kiuj garantias progreson de nia movado en Germanio. Citinde estas ankoraŭ, ke ĉe la asoci-tago oni senescepte nur uzis nian komunan lingvon.

La sekvanta (VII.) asoci-tago okazas en Nürnberg (Bavario).

Post kvar sufiĉe streĉaj laborkunsidoj la asoci-tago finiĝis la unuan festtagon, vespere je la 5.30 horo kun la kanto de la internacio. Antaŭen al cel'.

SAT-ano 715.

KRONIKO

Aŭstrio

Wien. "ALLE"-grupo VI, Sandwirthgasse 2 (ne plu grupo VII, Lerchenfelderstr.) Wien VI, konsiderinte egan simpation al SAT, unuanime decidis sekvi la vojon de sia kolega grupo XXI, nome: aliĝi al SAT.

Ni intencis tion pli frue efektivigi, sed la mono . . .

Sub ĉia prezo estas akcelata — inter ni ĉiam regas konkordo — unuecfronto de la proletaro por la liberiga batalo. *La estraro*

Francio

Marseille. La SAT-grupo vigle daŭrigas sian propagandon. Sabaton, la 13. marto, k-do Demouliere faris antaŭ laboristaj kamaradoj en l' Estaque, tre sukcesintan propagandparoladon. K-do Ferrero alparolis poste la ĉeestantojn, klarigante la celon de SAT kaj instigante ilin lerni esperanton kaj ĝin uzi por sia klascelo.

De nun, k-do Bonnafoux iras ĉiujaŭde vespere en l' Estaque por gvidi kurson por komencantoj. Espereble la SAT-anaro multe pliiĝos en Marseille dum tiu ĉi jaro.

La grupo ne laciĝas kaj baldaŭ novaj prelegoj kaj konferencoj estos faritaj en la diversaj partoj de la urbo kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo. Antaŭen por la emancipo de la proletoj. La peranto *Ferrero*

Japanio

Okajamo. Kelkaj skizoj pri nia "Japana Junula Ligo Esperantista". Okaze de la XIII. Japana Esperanto-kongreso kolektiĝis sufiĉe multe da "Esperantistoj", tamen ili kunvenis nur mase. Ili kunvenis ne por decidi gravajn aferojn pri esperanta movado. La kongreso komenciĝis per la "solena" kantado de "La Espero", kaj finiĝis per luksa ekskurso. Unuvorte ili kunvenis en Kioto por elspezi ilian "superfluan" monon, por aŭskulti lingvo-similan babiladon de "eminentaj" esperantistoj.

Okaze de la postkongreso en Osaka, ni, klaskonsciaj junaj esperantistoj alvokis al la junuloj kaj studentoj kaj interkonsiliĝis pri organizo de l' "Junula Ligo".

Ĉirkaŭ 20 seriozaj junuloj partoprenis la interkonsiliĝadon kaj elektis 2 komitatojn, por ke la organizo povu rapide kreski.

La 15. nov. unua kongreso okazis kaj fondis la Junulan Ligon. Ni decidis la jenajn tri gravajn tezojn: 1. Unuigita fronto. 2. Serioza esploro de gvidprincipo. 3. Praktika apliko de Esperanto.

La 4. januaro 1926 ni kunvenis en Tokio por fondi Tokian filion.

Observante la konturan strukturon de japana ĝisnuna esperanta movado, ni trovas en ĝi tri tendencojn: 1. Tiel nomata neŭtraleco, nur lingva disvastigo. 2. Ŝovinista movado, nome, ekskluziva malamo kontraŭ fremdaj lingvoj (angla, germana, ktp.) 3. Utopia, sentimentala homaranismo. Inter ili, la tria grupo estas por ni konsiderinda ĝis tia grado, ke ni lerte kunlaboru kun ili, gvidi ilin en nian kampon, por ke ni plene kritiku la antaŭajn 2 grupojn. — Ni nun alvokis al la iom seriozaj esperantistoj kaj postulas ilian kunlaboron. — La 23. febr. 1926 aperis nia unua bulteno. Ĉar ĝi estas nacia organo, ni uzis nur japanan lingvon.

Neŭtralaj esperantistoj kunvenas ĉiujare en grandaj urboj. En jaro 1926 ili okazigos sian XIV. Kongreson en Tokio. Ni ankaŭ aparte kunvenos kaj diskutos pri la gvidado de nia ligo.

Fine mi petas ke vi, eksterlandaj — tutmondaj sennaciuloj — helpu al ni! Ni helpu al vi reciproke, por ke nia venko rapide proksimiĝu! *SAT 4972*



VIa SAT-KONGRESO EN LENINGRAD

1. KOMUNIKO

KONGRES-KOMITATO

Sciigota en sekvonta komuniko.

KORESPONDADRESO:

K-do S. Podkaminer, Petropavlovskaja 4, kv. 34, Leningrad — Sovetio.

KOTIZO: Egala al la jara SAT-kotizo.

ALIĜILOJ

Skribu la nomon, antaŭnomon, adreson, profesion, partitendencon, n-o de SAT-matrikulo, aktiva aŭ pasiva, membrecon.

Al la SAT-anaro Tutmonda!

Karaj gekamaradoj!

Ekzekutiva komitato de SAT akceptis inviton de Leningrada SAT-grupo. *Unuafoje* en la historio la tutmonda revolucia laborista esp-istaro kunvenos en nia urbo. Unuafoje Rusio akceptos la kongreson de la plej antaŭenema parto de l' tutmonda laboristaro celanta detrui unu el la plej fortaj baroj sur la vojo al la liberiĝo — diverslingvecon. Unuafoje dum ekzisto de SAT, la SAT-anaro kolektiĝos en Sovetio, kie ĝi trovos vere sinceran kaj aman akcepton. Ni, leningradaj SAT-anoj tre bone komprenas kian kolosan signifon devas havi ĉi tiu kongreso por la revolucia esperantismo, sciante, ke niaj tutmondaj kamaradoj sentas grandegan intereson al la nova vivo kiun konstruas malgraŭ grandegaj malfacilaĵoj sovetia laboristaro. Ni, leningradaj SAT-anoj streĉos ĉiujn fortojn por kontentigi vian tre kompreneblan scivolemon. Do, alveturu grandamase, gekamaradoj, vizitu niajn fabrikojn, lernejojn, klubojn, oficialajn instituciojn, ktp. — vi vidos propraokule ĉiujn flankojn de nia vivo. Reveninte hejmen vi havos eblecon rakonti al la laboristaro tutmonda, la veron pri Sovetio, kiun vi ekkonos per *Esperanto*.

Jen unu grava signifo de nia VI.

Due, por ni, sovetiaj SAT-anoj la kongreso havos gravan postsekvon, ĉar ĝi klare montros al laboristaro sovetia, al ĝiaj gvidorganoj pli kaj pli favoriĝantaj al Esperanto la necesecon de lingvo internacia por la tutmonda proletaro.

Do, fariĝu nia kongreso grandioza demonstracio de la proletara unueco per lingvo internacia. Ni scias, ke alveturi en Sovetion estas malfacile, sed ni esperas, ke lokaj SAT-grupoj helpos al la delegitoj viziti la kongreson. Niaflanke ni faros ĉion eblan por garantii al la kongreso fruktodonan laboron.

Do, bonvenon gekamaradoj!

ESTU NIA VI. GRAVA MANIFESTADO DE L' TUTMONDA PROLETARA SOLIDARECO!

VIVU NIA VIa! VIVU SAT!

Org. Komitato de la VI. SAT-Kongreso
Sekretario: *S. Podkaminer*

Verda Libertempo

Kio ĝi estas? — Kion ĝi volas?


Verda Libertempo estas la renkontejo de tiuj samideanoj, kiuj volas refreŝigi sin en verda naturo, ekzercante la verdan lingvon en rondo de anoj de la verda stelo! Verda Libertempo volas doni okazon uzi Esperanton en amika rondo per paroloj kaj kantoj. Samtempe ĝi volas estigi kaj firmigi amikecon inter anoj de diversaj nacioj. Krome per ĉio ĉi kune ĝi prezentas idealan refreŝigejon por korpo kaj animo. Do, partoprenante Verdan Libertempon, vi ne loĝas en urba aero, vi ne restados inter ŝtonoj dum via mallonga libertempo; vi havos okazon kunesti de la mateno ĝis la vespero kun gesamideanoj, babilante aŭ kantante en belega regiono nian karan lingvon! Komunaj belaj kaj interesaj travivaĵoj firme kaj kore interligos vin kun la ceteraj gepartoprenantoj, al kiu ajn nacio ili apartenu! Ke Verda Libertempo plenumas sian promeson, tion atestas tiuj, kiuj pasintjare plendis la rapidan pasigon de tiu paradiza "tempo en Esperantujo". — Do, se vi ŝatas travivi nian ideon en praktiko, venu!

(Vidu la anoncon en n-o 28!) *L. Funken.*

SAT-INSIGNOJ



Rich. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1



Formato 37×25 cm, 36 paĝoj
prezo 1,80 mk. g.

La malgranda Terbiblio ne montras vojojn al migranto, por tio servas specialaj atlasoj. 10 kartojn prezentas 10 terleĝojn: 1. Terpartoj, 2. Mondriveroj (Mondfluegoj, Mondmarfluoj), 3. Altlandoj de la mondo, 4. Maroj kaj landoj, 5. Mar- kaj firmlandoj, 6. Pra- kaj homlando (neloĝebla kaj homloĝebla lando), 7. Tersupraĵo, 8. Homdenseco (-dissemiteco), 9. Mastrumado (ekonomia), 10. Kreskado.

Mendu ĉe:
Administracio de SAT
Rich. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG